



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Numero 6 · Novembro/Decembro 1962

Kulmino de nia asocia vivo en 1962:

GEFA — jarkunveno en Münster

160 gekolegoj el ses landoj

Dum la 19a ĝis la 21a de oktobro 1962 akceptis la vestfalia urbo Münster la membrojn de la Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) por ilia 6a jarkunveno. La modele preparitaj aranĝoj, inter kiuj elstaris la brila festvespero, demonstris denove la taŭgecon de Esperanto kiel kultura kaj faka lingvo. Krom gastoj el Britio, Francio, Hungario, Nederlando kaj Pollando estis reprezentitaj ankaŭ la fervoja direkcio, la socialorganizo kaj la sindikato.

Kiam GEFA antaŭ 6 jaroj laŭ sugesto de multaj membroj enkondukis jarkunvenon, kelkiuj eble demandis sin: ĉu ne okazas jam sufiĉe da kongresoj en Esperantujo? Evidentiĝis en la sekvaj jarkunvenoj, ke la kontaktiĝo inter la GEFA-anoj kaj la atentigo pri Esperanto al la fervojaj instancoj nepre necesas. La nivelo pliboniĝis, kaj la intereso de niaj membroj kreskis en periodo, kie la por-esperanta agado estas minacata per multaj aliaj ŝatokupoj.

Tiun jaron GEFA estis sekvinta volonte la inviton de la nordgermana distrikto Münster. Münster, kies historio kaj nuntempa stato estis priskribita jam en antaŭa eldono de nia BULTENO, akceptis la alvenintojn per saluttabulo afable instalita de la urbo antaŭ la stacidomo (nia bildo). Pro tio, ke krom la fervojistoj kongresis la filozofoj, ankaŭ la lastaj estis honorigataj per saluttabulo. Prezentigis do nekutima, sed certe okulfrapa kombino. Fiere flirtis apude la GEFA-flago. En la halo de la moderna stacidomo atentigis allogaj afiŝoj kun

aktuala teksto pri la jarkunveno de GEFA konekse kun REVELO (Rejnlandvestfalia Ligo).

Komforta loĝigo

LKK estis instalinta en la stacidomo bonege funkciantan akceptejon, kies manko dum aliaj kongresoj facile povas ĉagrenigi la ĵus alvenintajn kongresanojn. Pere de f-ino Sander oni ricevis baldaŭ siajn kongresdokumentojn kaj ankaŭ trovis la fervojan lernejon, kie la plej multaj loĝis en komfortaj dultitaj ĉambroj. La impona konstruaĵo servis ne nur por la loĝigo, kiun organizis modele s-ano Schrapp, ĝi estis grandparte ankaŭ



„Saluttabulo antaŭ la stacidomo“

kongresejo. S-ro Schlüter, la senlaca porkultura komisiito de la distrikto Münster, uzis la favoran okazon de komuna loĝado por ekspozicii samtempe pentraĵojn kaj Esperanto-poŝtmarkojn. Li permesis cetere, ke la distrikta informilo de la socialorganizo enhavis specialan dulingvan salutvorton por ni.

Gazetara konferenco

Sed ni reveturu al la urba centro, kie en hotelo la invititaj ĵurnalistoj aŭskultis la informojn de la GEFA-estraro. Partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la socialorganizo kaj de la LKK. Kiel ofte oni povis konstati, ke la ĵurnalistoj apenaŭ sciis ion konkretan pri la rolo de Esperanto aŭ pri la interlingvistika problemo. Komence montriĝis nur la rutina scivolemo, poste evoluis vigla dikuto. La rezulto de tiu konferenco estis objektiva kaj principe pozitiva informigo en la lokaj kaj distriktaĵ gazetoj jam unu tagon poste.

Nepublikaj laborkunsidoj


Okazis du laborkunsidoj, unu de la GEFA-estraro kaj alia de la estraranoj kun la distriktaĵ komisiitoj, ambaŭ gviditaj de la GEFA-prezidanto Gießner. S-ro Rummel, la reprezentanto de la Ĉefestraro de la Fervoja Sociala Organizo, demonstris per sia ĉeesto kaj diskuto la intereson por la jarkunveno. La tagordo ampleksis multajn punktojn gravajn por la agado, la nunan staton de la terminara laboro, la varbadon, la ligojn kun la fervojaj instancoj kaj aliaj organizoj. La kunsidoj ne estis publikaj.



„Afiŝoj antaŭ la akceptejo“

Lingvaj ekzamenoj

Laŭ la reguloj de la Germana Esperanto-Instituto ekzamenis la ekzamenkomitato kvin kandidatojn en la lingva kaj kursgvidanta kapableco. Ĉiuj kandidatoj sukcesis. La buŝa parto estis publika. Ne mirinde, ke la publiko uzis tiun okazon por informi sin en la plena salono pri la postuloj. Espereble kelkiu aŭskultinto konfirmis sian kuraĝon baldaŭ mem plenumi la ekzamenon. Al la ekzamenkomitato apartenas nur fervojistoj (d-ro Lang, Jäger kaj Korth). Estas projektite fondi duan ekzamenkomitaton.



„LKK-estro Brandenburg parolas dum la festvespero“

Brila festvespero

Sabaton, la 20an de oktobro la kongresanoj de GEFA kaj REVELO kolektiĝis en la salonego de la restoracio Freitag situanta meze en la urbo. Jam antaŭe oni estis preninta la vespermanĝon en amika sfero. Konatuloj de en- kaj eksterlando baldaŭ plenigis la seĝojn. De sur la muro salutis la emblemo de GEFA, kaj Esperanto-flago ornamis la scenejon. Viglaj konversacioj regis, kelneroĵ rapidis. Ekstere la eldonejo Limburger Vereinsdruckerei ofertis riĉan kolekton je literaturo.

Kun — bedaŭrinde — iom da prokrasto pro lastmomente faritaj ŝanĝoj la arĉkvarteto komencis la festvesperon per muzikaĵo de Beethoven. Estis ĝuide aŭskulti la junajn, fervorajn muzikistojn, kiuj ĉiuj estas gefiloj de fervojistoj. S-ano Brandenburg, lerta gvidanto de la LKK kaj komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Münster estis la unua en la vico de la parolantoj. Li salutis la multnombrajn personojn petante indulgon pro kelkaj komplikaj. GEFA-prezidanto Gießner salutis la gastejojn en jena sinsekvo:

s-ro Klein, direktoro ĉe la fervoja direkcio Münster kaj komitatestro de la Fervoja Sociala Organizo,

s-ro Rummel, kultura sekciestro ĉe la Ĉefestraro de la Fervoja Socialorganizo,

s-roj Möller kaj Meißner, distriktaĵaj reprezentantoj de la Fervoja Socialorganizo,

s-ro Schlüter, distrikta komisiito por kulturaj aferoj,

s-ro Ruhoff, loka reprezentanto de la Fervoja Socialorganizo,

s-ro Drechsler, loka reprezentanto de la Sindikato de Germanaj Fervojistoj,

s-ro Jong, prezidanto de la Internacia Federacio Esperantista Fervojista (IFEF),

s-roj Poptie kaj Look, sekretarioj de IFEF kaj la eksterlandaj delegitoj, kies nomoj aperas sube.

S-ro Klein transdonis la bondezirojn de la malhelpita direkcia prezidanto Schröter kaj salutis la jarkunvenon nome de la Fervoja Socialorganizo. S-ro Drechsler ĵus reveninte de internacia sindikata konferenco en Helsinko konstatis kun ĝojo la utilecon de Esperanto kontraste al la kutima lingva konfuzo. Li promesis favorigon laŭ siaj fortoj.

Eksterlandanoj salutis

Kiel unua eksterlanda delegito s-ano Barks el Britio salutis en sprita maniero la kunvenon kaj invitis je multnombra partopreno al la venontjara IFEF-kongreso en Stoke-on-Trent, kie li loĝas.

Nome de la franca IFEF-sekcio s-ano Coyac transdonis la bondezirojn dankante pro la bona loĝigo. Li invitis al la jarkunveno de la francaj fervojistoj komence de decembro. Por Hungario salutis s-ano Anka bone konata kiel LKK-ano dum la IFEF-kongreso en Budapeŝto. Li raportis pri la forte kreskanta Esperanto-intereso inter la hungaraj fervojistoj. Sian ĝojon pri la vizitinda kongresurbo Münster esprimis la nederlanda delegito van Lowen. Li konstatis konsiderinde grandan nombron da junuloj kaj oficialaj reprezentantoj en nia jarkunveno.

Ĉarmajn salutojn dediĉis la pola f-ino Sidora, kvankam ŝi ne estas fervojistino.

Por IFEF prenis la parolon la vaste konata prezidanto de Jong el Amsterdam. Sincere li dankis pro la bonega gastigado kaj klopodoj de la LKK. Li substrekis la gravecon de GEFA interne de IFEF, laŭdis la harmonian kunlaboron kaj atentigis ankoraŭfoje pri la venontjara IFEF-kongreso. Li kaj ĉiuj parolintoj ricevis fortan aplaudon.

Jarraporto de la prezidanto

GEFA-prezidanto Gießner komence menciis, ke tiu sesa jarkunveno same kiel la antaŭaj fariĝis bonega rimedo por la flegado de personaj kontaktoj, ankaŭ sur internacia ebena. Li salutis la

REVELO-anojn, kiuj kune kun GEFA havis sian regionan renkontigon. La memoro estis dediĉata al s-ano Hasse, unu el la iamaj prezidantoj de GEFA. Li forpasis la 9an de marto 1962 en la aĝo de 72 jaroj. De 1954 ĝis 1956 li gvidis la asocion. (Vidu ankaŭ la koncernen artikolon en n-ro 3/62 de BULTENO.) La hispana s-ano Valadrigas en Hispanio sendis kortsuŝan dankleteron por donacita mono por viktimoj de la aŭtuna inundego. Prezidanto Gießner okupiĝis pri diversaj organizaj ŝanĝoj en la asocio. Pro deĵoraj kaŭzoj aŭ pro sanstato devis transdoni sian oficon kiel distrikt-komisiito s-anoj Barmaneter (distrikto Augsburg), Westfelling (Köln) kaj Kibele (Stuttgart), al kiuj la estraro ankoraŭfoje dankas pro la parte longjara, fidela kunhelpo. Anstataŭis ilin la kolegoj Schiessl (distrikto Augsburg), Mester (Köln) kaj Roth (Stuttgart). Krome ekagis s-ano Heimlich (Hannover). Al ili estis dezirataj fruktodona laboro kaj kontentigaj rezultoj por la bono de GEFA kaj IFEF. Krome estis dankata s-ano Korth, kiu post unujara redaktado pro deĵora troŝarĝo devis redoni sian oficon. Li vere meritas la dankon de la asocio. Lin sekvis komence de 1962 s-ano Bar-nickel, jam antaŭe estrarano de GEFA.

Je tiu okazo estis atentigata pri la 10jara jubileo de nia organo BULTENO, pri kiu detale raportis la oktobra eldono. En decembro 1961 krome aperis speciala numero pri la historio de GEFA, ankoraŭ havebla por interesuloj.

Fruktoj de longaj klopodoj estis la starigo de propra ekzamenkomitato sub la gvidado de d-ro Lang. Ĝi laboras laŭ la statutoj de la Germana Esperanto-Instituto. En la lasta tempo GEFA aĉetis stokon de gravaj verkoj el la Esperanto-literaturo. En BULTENO aperos listo de ili kaj detaloj pri la prunteprenoj. Rekomendinde estas ankaŭ arkivo pri Esperanto-aranĝoj, artikoloj, tradukoj, bildoj ktp, por ke niaj posteluloj havu eble plej kompletan impreson pri la nuna epoko. Ĉiuj membroj estas petataj kunhelpi.

En organoj de la fervojo, socialorganizo, sindikato kaj en lokaj gazetoj aperis serio da artikoloj pri niaj kongresoj, kelkfoje ĝeneralaj artikoloj kaj ankaŭ pri Esperanto-poŝtmarkoj. Dankon al ĉiuj fervoraj verkintoj, kiuj instigu aliajn kapablajn s-anojn por tiu grava laboro. La reklamoficejo preparis la eldonon de la oka faldprospekto en Esperanto, ĉar la aliaj preskaŭ tute elĉerpiĝis. Multaj fervojistaj esperantistoj estas delegitoj de UEA kaj kunhelpas vastigi la bonan reputacion de la delegita reto. Bedaŭrinde la Germana Federacia Fervojo ankoraŭ ne permesis la elpendigon de informtabuloj en pli gravaj stacidomoj. La dokumenta servo envicigis en sian kolekton jam du fakprelegojn el IFEF-kongresoj.

Fine la GEFA-prezidanto direktis la atenton al la senlaca kaj oferplena laboro en la fervoja terminaro. Sendube ĝi estas unu el la antaŭkondiĉoj por la senriproĉa interkomprenado inter samfakuloj diversnaciaj. GEFA esploras eblojn, por atingi taŭgan solvon kun konkretaj rezultoj. Entute elstaraj okazintaĵoj ne estis tiun jaron, la asocio kontentige vivis kaj evoluis helpe de daŭra kunlaboro en ĉiuj distriktoj. Al ili estis direktataj la varma danko de la GEFA-estraro kun la peto daŭrigi la ofte dornoplenajn klopodojn por la bonfarto de nia faka organizo kaj por Esperanto.



„Folkloro danĝrupo“

Allogaj kantaĵoj kaj dancoj

Helga Weber, blonda belulino el Osnabrück, prezentis kiel soprkantistino operetajn kaj popolajn kantojn. Ŝi rikoltis ne nur grandan aplaudon, sed ankaŭ florbukedon akceptitan kun ĉarma rideto. Dancoj el Malsupra Germanio, kiajn oni vidas nuntempe ne tre ofte, ravis la rigardantojn kaj instigis la fotoamatorojn. Allogis ankaŭ la belaj folkloraj kostumoj (nia bildo).

Franca teatraĵo

Oni povus dubi, ĉu la teatraĵo kun la nefacile komparebla titolo „La tikla dosiero“ prezentis la kulminon de la vespero. Ĉiukaze, dum 45 minutoj la rigardantoj travivis amuzajn scenojn pri loĝiga problemo, kie ridado kaj aplaŭdo sinsekvis. Ludis gekolegoj el Francio, ĉiuj amatoraj aktoroj. Nur pro insista peto de la trupestrino ni devas rezigni laŭdon de unuopaj personoj. Entute la „Pepulo“, kiuj ludis sprite kaj humore, estu tutkore dankataj. La verko povus toleri kelkajn mallongigojn ekz. rezignon de la sufloro-aktoro. Iom tro haste je la fino la skeĉo trovis sian solvon. La aplaŭdo estis bone merita.

Post la oficiala programo fine la dancemuloj povis obei la ekscitajn melodiojn de la muzikistoj. La senlaculoj devis perforte vokataj por atingi la lastan specialan omnibuson al la tranoktejo.

1963 en Regensburg

La fakto, ke la turisma flanko estas tuŝita nur fine de la raporto, ne diras ion kontraŭ la urbo. Estas inverse. Münster vere meritis la viziton. Jam la grandstile novkonstruita stacidomo kaj la apuda direkcia konstruaĵo bone impresis. Kun plezuro ni sekvis la spertan gvidanton dum la rondveturado, kiu kondukis ankaŭ al la ruĝstona akvokastelo ekstere de la urbo. La direkcia kaj lerneja kantinoj faris sian eblon por kontentigi ĉiujn, kio laŭdire bone sukcesis. Kiu preferis la viziton al unu el la belaj preĝejoj aŭ al tipa restoracio, ankaŭ trovis okazon. Horojn post la fino de la oficialaj aranĝoj dekoj da kongresanoj ankoraŭ ĝuis sur la teraso de la lernejo la fortan aŭtunan sunon.

Venontjare ni kunvenos en Sudgermanio, tie, kie la gotikaj turoj de la katedralo de Regensburg respegulas sin en la Donau-rivero. Sendube la LKK laboros tiel bone kiel tiu de Münster, al kiu ni ŝaldas multan dankon. W. B.

Jahrestreffen in Münster

Unter Beteiligung von Gästen aus Frankreich, Großbritannien, Niederlande, Polen und Ungarn hielten die deutschen Eisenbahner-Esperantisten ihre diesjährige Jahresversammlung in Münster ab. Die gut besuchten Veranstaltungen, in deren Mittelpunkt ein Festabend stand, bewiesen die vom BSW geförderte Verbundenheit mit ausländischen Kollegen sowie die Verwendungsfähigkeit des Esperanto auf eisenbahn-technischem Gebiet.

Der Vorsitzende der Vereinigung, Gießner, wies in seinem Jahresbericht auf die vorbildliche Arbeit der Eisenbahner-Esperantisten in ihren Gruppen und Bezirken sowie in Landesverbänden und auf internationaler Ebene hin. Die Organe und Mitteilungsblätter der DB, des BSW und der Gewerkschaften hätten laufend über Esperanto-Veranstaltungen berichtet. Der Dokumentationsdienst habe wiederum den Text des Fachvortrags beim Internationalen Verbandskongress in Bu-

dapest erfasta. Das Werbeamt plane die Herausgabe eines neuen Faltprospektes. Gießner gedachte des 1962 verstorbenen früheren Vorsitzenden BR i. R. Hasse. Einige Bezirksbeauftragten haben aus dienstlichen und persönlichen Gründen ihr Amt in andere Hände übergeben müssen. Auch die Schriftleitung hat gewechselt. Erfreulicherweise konnte eine eigene Prüfungskommission unter Leitung von Dr. Lang gebildet werden. Nach den Satzungen des Deutschen Esperanto-Instituts nahm sie in Münster mehrere Sprach- und Kursleiterprüfungen ab. Die Arbeit am Eisenbahn-Fachwörterbuch wird fortgesetzt.

Der Festabend wurde mit Gesangs-, Volkstanz- und Musikdarbietungen umrahmt. Eine Laienspielschar französischer Kollegen brachte ein heiteres Theaterstück. Vertreter der BD Münster, des BSW und der GdED überbrachten Grüße und Wünsche, ebenfalls die Delegierten der ausländischen Verbände.

Vorstand und Bezirksbeauftragte führten Arbeitssitzungen durch. In der Bundesbahnschule, in der die meisten Teilnehmer untergebracht waren, fanden Film- und Lichtbildervorträge statt, ferner eine Gemälde- und Briefmarkenausstellung. Mit Unterstützung des BSW wurde die 6. Jahresversammlung, die auch eine positive Würdigung in der örtlichen Presse fand, ein voller Erfolg. Allen, die an der Ausgestaltung beteiligt waren, sei herzlich gedankt.

W. B.

Unurela pendferovo en Moskvo

Antaŭ nelonge estas finita la teknika projektado de pendferovo konstruota en Moskvo. La relaro estos fiksata sur kolonoj, kiuj staros en distanco de 30 m.

La koncerna linio havos longecon de 30 km kaj interligos la subteran fervojreton de Moskvo kun ĝia flughaveno. La trajno konsistos aŭ el 20 m longaj vagonoj aŭ el triparta vagonarunuo. Kvar elektraĵ motoroj ebligos la rapidecon de 150 km/h, tiel ke por la vojo de la urbo ĝis la flughaveno estos bezonata nur 15 minutoj. Por la akcelo de la pendferovo estas esplorataj diversaj sistemoj. Unu el ili antaŭvidas, ke la elektra motoro estos fiksata direkte sur la akso, per kio oni esperas

ŝpari 20% de la energio. La radoj ricevos gumoringojn. La kostoj estas laŭdire nur unu dekkvino de respektiva subtera linio.

W. B.

Fervojistoj el eksterlando

8482 laboristojn el eksterlando okupigas nuntempe la Germana Federacia Fervojo. Kun 6656 laboristoj la italoj estas reprezentataj plejmulte, dum venas el Hispanio 1299 kaj el Grekio 171 laboristoj. La resto de 356 laboristoj venas el Nederlando, Belgio, Turkio, Maroko kaj Afganio. La eksterlandaj laboristoj servas ĉefe por traklaboroj kaj en grandaj ŝarĝstacioj. La plej multaj loĝas en fervojaj hejmoj.

Aŭtomate regata fervojponto

En Usono oni konstruis fervojan ponton, kiu en normala pozicio estas levita kaj permesas la traveturadon de ŝipoj. Kiam trajno alproksimiĝas, estas elektraj donataj avertsignaloj de loko malproksima 3,2 km de la ponto. La ponto malleviĝas. Fotoelektraĵ ĉeloj interrompas la malleviĝon, kiam ŝipo estas ankoraŭ traveturanta sub la ponto. Post la malleviĝo la signaloj anoncas liberan veturon por la trajno. Post ties trapaso la ponto leviĝas aŭtomate. La trajntrafiko tra tiu ponto estas malfrekventa (nur du trajnoj potage).

Aŭtomate regata trajno

Sur la 823 m longa subtera linio inter Times Square kaj Grand Central en New York cirkulas pasaĝertrajnoj, kiuj estas gvidataj per elektrona sistemo. En gvidcentro per trukartoj estas sendataj la korentimpulsoj al la reloj kaj de tiuj al la vagonoj. Riceviloj akceptas kaj plifortigas la impulsojn. La tiel senditaj signaloj estas deĉifrataj kaj funkciigas la necesajn manipulojn. La kostoj por la preparlaboroj estis ĉirkaŭ 500000 dolaroj.

W. B.

Ĉirkaŭe la montoj trankvilas.

En l' arbopintoj sentas vi

eĉ ne bloveton,

jam dormas la birdoj arbaraj.

Atendu, ĉar ankaŭ ripozos vi.

Goethe

Ni legis en ...

AGADO de Esperantistoj en Jihlava/Ĉeĥoslovakio raportas (en julio-septembro) pri la ekstera bildo de la IFEF-kongreso en Budapeŝto.

Bulgara Esperantisto, organo de la Bulgara Esperantista Asocio, alvokas (en sept.) „Al Lingva Perfektiĝo“ pro la venontjara UE-kongreso en Sofio.

Bulteno de la aŭstria sekcio de IFEF finas (en n-ro 4) la raporton pri la IFEF-kongreso en Budapeŝto. Nova estas la aldonita „Esperanto-Informationskurs“.

DEFA-BULTENO, membra organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio, dediĉas la frontpaĝon (en n-ro 11) al la

demando: „Ĉu unu granda aŭ pluraj malgrandaj asocioj?“

Die Bundesbahn, oficiala organo de la Germana Federacia Fervojo publikigas (en n-ro 14) germanlingvan raporton pri la IFEF-kongreso en Budapeŝto.

El Popola Ĉinio, eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo, enhavas (en n-ro 5)

artikolon pri la IFEF-kongreso en Budapeŝt. Lingvaj demandoj estas traktataj (geografiaj nomoj kaj alfabeto). Post longa paŭzo aperas raporto pri la pekina Esperanto-grupo.

Esperanto-Literaturo, katalogo de la „Eldona Societo Esperanto, Box 7043, Malmö 7 / Svedio“, publicas titolopegojn kun resumoj de konataj verkoj ekz. „Pasko“, dramo de Strindberg, „Sveda Antologio“ de S. Jansson, „Kon-tiki“ de T. Heyerdahl, „La normandaj rakontoj“ de Maupassant kaj „La Fino“ de F. Bernadotte.

Esperanto en Skotlando, oficiala bulteno de la skota federacio esperantista interese priskribas (en n-ro 4) la skotan folkloron kaj orniadon.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, enhavas (en sept.) ĉefe la protokolon pri la 16a FERN-jarkunveno.

Franca Esperantisto, organo de la franca Esperanto-movado, donas (en n-ro 212) impresojn ekster la oficiala

programo de la UE-kongreso en Kopenhago.

Hungara Fervojista Mondo daŭrigas (en n-ro 3) sian vere detaliĉan raporton pri la IFEF-kongreso en Budapeŝt. Eĉ la kompleta salutparolo de la GEFA-prezidanto ne mankas.

Jugoslavia Fervojisto, organo de la Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistaj, ankaŭ en sia septembra eldono modele respegulas la tian fakan kaj esperantistan vivon.

Kulturaj Kajeroj, eldonitaj de la kulturdoma prezidanto en Francio, prezentas (en n-ro 5) „Kulto de vino“ kaj „La ciganoj“.

La Praktiko, la gazeto de la mondpopolo, okupiĝas (en aŭg.) i. a. pri la Inka-popolo en Sudameriko.

La Fervojisto, organo de la Franca IFEF-sekcio, represigas el nia BULTENO ekstrakte „Kongresanalizo“ kaj anoncas la jarkunvenon de FFEA por 1./2. de decembro 1962 en Paris, 14 Rue Traversière, Salle Sud Est proksime de la Lyon-stacidomo.

Lingua Club, organo de hispana poliglota societo, dediĉas parton de sia kajero al verkoj en Esperanto. La traduko de la germanlingvaj kontribuoj aspektas iom kurioza.

NOVA CIVITO, esperantigita eldono de katolika revuo, moderna laŭ grafika aspekto, respondas i. a. al la demando „Kion vi farus, se vi renaskiĝus?“

PACO, organo de la mondpace esperantista movado aperas ĉifoje en alia lando. La atigustan eldonon prizorgis Ĉinio. Nova estas la adaptita bildrakonto. La respondo al leganto, kiamaniere la nuntempa balota sistemo diferencigas de la nacireĝimo, ne kontentigas.

Svisa Fervojisto, bulteno de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, donas (en okt.) superrigardon pri Stoke-on-Trent, la IFEF-kongresurbo en 1963.

The Worker Esperantist, organo de la brita esperantista laboristaro, okupiĝas (en okt.) pri „La Lingvaj Problemoj de la Eŭropa Integriĝo“. Laŭdire por la disponigo de Esperanto mankas ankoraŭ gravaj antaŭkondiĉoj. W. B.

El la grupoj

Weiden/Opf.

La lastaj monatoj portis al nia grupo multajn interesajn kaj belajn okazintaĵojn. Kelkajn monatojn pasigis nia kara hispana s-ano Cunjat, kiu jam dum la pasinta jaro laboris ĉe weidena entrepreno, denove kiel gasto ĉe s-ano Jensch en nia regiono. Estis kompreneble, ke li ĉiam estis bonvena gasto en niaj regule ĉiusemajne okazantaj grup-vesperoj. Alia hispana s-ano el Barcelono, persona amiko de s-ano Cunjat kaj leteramiko de nia klubano Dandorfer, sekvis ilian inviton resti du semajnojn en Weiden. Ankaŭ nia dua gasto eksterlanda jam persone konis preskaŭ la duonon de la grupanoj, ĉar dekludi el ni vizitis la IFEF-kongreson en Barcelono. Diversaj ekskursoj, amuzaj kunvenoj kaj prelego publika pri Esperanto de s-ano Stahl en la kulturklubo „Ponda Palästra“ estos belaj memoroj por niaj hispanaj amikoj. Ankaŭ aŭtoveturado al la ĉeĥoslovaka limo kaj kelktaga restado en Berlino estis tre interesaj travivaĵoj por ili.

La grandiozajn IFEF-kongrestagojn en Budapeŝto travivis du anoj de nia grupo. Post kelkaj semajnoj jam montris

klubano Landgraf al la grupanoj, kiuj ne povis kongresi, per belaj kolordia-pozitivaj la belajojn de la Hungarlando. Grandformatan artikolon pri la Budapeŝta Kongreso kaj pri la impresoj de la Weidenaj partoprenintoj publikigis nia gazeto. Ankaŭ faksimila salutkarto aperis en nia gazeto. Dum la ĝenerala kongres-tempo ni atendis pluajn gastejojn en Weiden, ĉar nia grupo diligente korespondadas. Sed bedaŭrinde ne ĉio estas oro, kio brilas, kaj ne ĉiu estas samideano, kiu uzas la lingvon Esperanto. Ankaŭ ni devis sperti tion. Sed ni ne volas plendi, ni nur gajnis pluan amaran vivosperton.

Grandan ĝojon portis al ni la vizito de nia al multaj el nia grupo jam longtempe persone konata s-ino Birgit Hviid el Aarhus. Ŝi sekvis inviton de nia grupestro s-ano König. Ŝia gaja personeco helpis nin rapide forgesi la ĉargrenon pri la antaŭa vizitinto. En gaja kaj amuza rondo ni travivis kun nia gasto el Danio belajn horojn en vera samideana sfero ĝis meznokto. Ankaŭ pri tiu eksterlanda vizito en nia grupo raportis la loka gazeto favore. Ke ankoraŭ

jugoslava s-ano el Celje, Jozica Motoh multjara leteramikino de nia estro, sekvis lian inviton pasigi kelkajn tagojn en Weiden, eksterordinare ĝojigis nin. La 22an de aŭgusto ŝi alvenis revoĝante el Amsterdamo, kie ŝi estis pasiginta kelkajn tagojn ĉe geamikoj post la UE-kongreso. Dum la vojaĝo al Kopenhago kaj reen ŝi interrompis la veturadon en Munkeno. Per afabla helpo de munkenaj s-anoj nia gasto ankaŭ povis rigardi la vidindaĵojn de la bavara ĉefurbo. Ankaŭ kune kun s-ino Motoh ni travivis belajn horojn en nia klubejo, kiuj speciale niaj novaj klubanoj instigos resti ĉe ni kaj diligente lerni nian lingvon. Preskaŭ unu semajnon pasigis nia kara gasto en Weiden, kaj kelkaj grupanoj bonvenigis ŝin en siaj hejmoj.

Malgraŭ la somera kaj feria tempo kaj eksterlandaj vizitintoj ni ne forgesas pligrandigi la nombron de niaj klubanoj. Tri junulinoj jam ekstudis le „misterojn“ de nia lingvo. Ili venis al ni libervole kaj tio estas bona signo, ke ili certe restos ĉe ni. Ke la korespondado de niaj grupanoj kun ĉ. 15 landoj ankoraŭ daŭras, ni konstatas kun fiero. Rich. König

Fervoja veturo laŭlonge de l' Rejno



En la paskaj ferioj mi veturis al Vestfalio. Mi uzis rapidvagonaron, kiu alportis min en rapida veturo de Saarbrücken al Mannheim. Tie mi devis ŝanĝi la trajnon. Per laŭtparolilo nun estis anoncata iu vagonaro. Jam muĝveturis elektra lokomotivo en la stacion. Tiu trajno tie estis disigata. La antaŭa parto pluveturis al Munkeno, dum la celo de la aliaj vagonoj estis Baselo. Poste venis mia aliĝtrajno, per kiu mi reveturis super la Rejnpono al Ludwigshafen. De tie mi veturadis tra Worms kaj Majenco al Wiesbaden. Jam la trian fojon mi transveturis la Rejnon. Profunde sub la ponto mi vidis peze ŝarĝitajn ŝipojn, kiuj alportis karbojn al fremdlandaj havenoj. Tio estis ekkonebla per la eksterlandaj flagoj, kiujn ili kunprenis. Dekstre de la Rejno mi traveturis la belan mezan Rejnvalon. Baldaŭ mi ekvidis meze de la Rejno etan insulon kun la „Muso-Turo“. Sur la alia Rejnborde situas la urbeto Bingen. Sur altega roko estas videbla la „Niederwald“-monumento. Nun mi vidis ambaŭflanke la vitejojn, kies pintoj ofte estas kronataj per mezepokaj kastelruinoj. En multaj kurboj

fluas la riverego tra la malvaŝta valo. Subite aperas tunelo, sur kiu la „Loreley“-roko krute de la bordo sin leviĝas. Ĉiam mi vidis ŝipojn sur la Rejno. Ĉe Oberlahnstein mi veturis trans la Lahn-rivero kaj ankaŭ vidis ĝian enfluejon. Denove estis transirata la Rejnpono, kaj baldaŭ poste la rapidvagonaro atingis la stacidomon de Koblenco. De tie mi restis maldekstre de la Rejno, preter Bonn, ĝis Kolonjo. Grandege staras la belega gotika katedralo inter stacidomo (nia bildo) kaj Rejnborde. Post mallonga restado la vojaĝo estis daŭrigata — denove trans la Rejnon. Vaste etendiĝas la urbo ambaŭflanke de la riverego. Grandaj, larĝaj pontoj interligas la du bordojn kaj lasas atingi piedirantojn same kiel veturilojn de unu urboflanko la alian.

Sed mia trajno pluveturis tra Solingen al Wuppertal. Unuafoje mi vidis la tian pendfervojon. Super la Wupper estas konstruita ŝtalskeleto, sub kiu pendas la vagonoj. La diversajn haltejojn oni povas atingi per altaj ŝtuparoj.

Baldaŭ poste mi alvenis en Hagen, kie nia trajno finiĝis. Birgitta Haubenthal

Esperanto auf Briefmarken

Unter der Schirmherrschaft des österreichischen Ministers für Verkehr, Elektrizität und Wirtschaft, Herrn Dipl.-Ing. Karl Waldbrunner, veranstaltete die Internationale Kulturorganisation der Eisenbahner (FISAIC) vom 9. bis 12. November 1962 in Wien die 2. Internationale Postwertzeichen-Ausstellung. Der Kulturausschuß der österreichischen Eisenbahner hatte es in dankenswerter Weise übernommen, den Festsaal des Bahnhofs Wien West für die reichhaltige Schau an Postwertzeichen auszugestalten. Unterstützt von zahlreichen Hinweisen und einer wohlwollenden Aufnahme durch die Presse erfreute sich die Ausstellung eines lebhaften Besuchs.

Herr Mager (HVB), Mitglied der Eisenbahner-Esperantogruppe Frankfurt, erhielt für seine Sammlung „Esperanto auf Briefmarken“ die bronzene Erinnerungsmedaille. Wir gratulieren herzlich zu dieser Auszeichnung.

Bildkartoj serĉataj

La „Fervoĵista Esperantista Rondo Nederlanda“ deziras bildkartojn kaj fotobildojn pri Zamenhof-stratoj kaj -monumentoj por ekspozicio, kiu estos aranĝata en Utrecht okaze de inaŭguro de Zamenhof-aleo kaj -monumento. Rekompenso oni sendos bildkarton pri la estonta Zamenhof-monumento. Adreso: J. J. Labordus, Kenastr. 26, Utrecht/Nederlanda.

Jubileo

Nia samideano Josef Kreutzen, Stolberg (Rhein), eksserva fervojinspektoro kaj membro de la fervojista Esperanto-grupo Köln, estis tiun aŭtonon esperantisto de 50 jaroj. Ni ĝojas pri tiu jubileo kaj deziras al li multe da prospero por la venontaj jaroj. GEFA-estraro

Skiferioj en Svislando

De la 26. 12. 1962 ĝis la 4. 1. 1963 okazos en Adelboden (Bernaj Alpoj) skiferio. Kostoj por plena pensio en alpa lignodomo estas 105 svisaj frankoj. Aliĝo al Cosette Giroud, Jonquilles 8, La Chaux — de-Fonds (Svislando).

75 Jahre internationale Sprache Esperanto

In diesem Jahre kann die Internationale Sprache Esperanto auf ihr 75jähriges Bestehen zurückblicken. Im Jahre 1887 erschien das erste Lehrbuch der „Lingvo Internacia“ von Dr. Esperanto (Pseudonym des Schöpfers, Dr. Ludwig Zamenhof) in russischer Sprache, dem bald Ausgaben in Deutsch, Englisch, Französisch und Polnisch folgten. Das Pseudonym des

Schöpfers wurde im Laufe der Jahre auf die Internationale Sprache selbst übertragen, die jetzt in der ganzen Welt unter dem Namen ESPERANTO bekannt und verbreitet ist. Heute gibt es Lehrbücher in wohl allen Landessprachen. Außer dem allgemeinen Wörterbuch, das heute 7866 Wortstämme enthält, sind bisher 114 Fachwörterbücher und -verzeichnisse über 46 Zweige der Wissenschaft, Technik und des Handwerks herausgebracht worden. Eine beachtliche Literatur aus Originalwerken und Übersetzungen aus der Weltliteratur wurde in den verfloßenen 75 Jahren geschaffen. In allen Teilen der Welt erscheinen über 100 Zeitungen und Zeitschriften schöngeistigen, fachlichen und religiösen Inhalts. Z. Zt. senden 16 Rundfunkanstalten in 12 Ländern regelmäßig 30 Esperantoprogramme in der Woche. Mehr als 600 Reiseprospekte von Ländern und Städten wurden bisher in Esperanto herausgegeben. Auch die Regierungen verschiedener Länder verwenden Esperanto zur Herausgabe aufklärender Bücher, Broschüren oder sonstiger Schriften. Die größte Esperanto-Organisation, der Esperanto-Weltbund, der seit 1954 in beratenden Beziehungen zur UNESCO steht, hat Mitglieder in 81 Ländern. Aus der bescheidenen Broschüre des Jahres 1887 hat sich eine weltweite Bewegung entwickelt, die ständig an Boden gewinnt. Bernhard Zenker



Ni deziras al
ĉiuj en- kaj
eksterlandaj
geamikoj

GAJAN
KRISTNASKON
KAJ
FELIĈAN
NOVJARON!

GEFA-estraro